



Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

## Kapabligo je universitata nivelo

La rubriko 'Malferme' de la maja numero de *Revuo Esperanto* (RE) esploras raporton de Unesko pri la stato de monda edukado, elstarigante la fortan korelacian inter la bona trejnado de instruistoj kaj studenta sukceso. Apoga artikolo esploras la oferton por tia trejnado por E-instruistoj, i.a. je oficialigita universitata nivelo.

Pri la stato de universitata agado rilate al Esperanto oni povas veplori (kiel en RE de marto 2014), aŭ defendi (RE aprilo 2014). Prefere al plorlarmoj, ni subtenu tion, kio ja ekzistas delonge, kaj kiu estis pene atingita. UEA havas taskon ne nur malfermi novajn terenojn, sed ankaŭ protekti kaj flegi jamajn sukcesojn.

Tial ni tiras la atenton al la tri-jara universitata kursaro en Poznano, Pollando, kiu portas oficialan agnoskon kaj ludas gravan rolon en la kreo de pli kapablaj instruistoj de nia lingvo. Ĝuste ĉi-jare plia tri-jara studado venos al sukcesa fino (post 15-jara tradicio), kaj en septembro 2014 estos la momento pretigi novan proponon, kiu povos funkcii kondiĉe je sufiĉa aliĝado. Jen bazaj faktoj pri la kursaro, de Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj (IS) kaj membro de la Akademio de Esperanto:



La pola Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano jam de 1998 regule ofertas siajn **3-jarajn postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio** en ekstera formo: nur unu intensan semajnon necesas pasigi en UAM ĉiusemestre, inter la sesioj la laborado okazas kun la helpo de la kursgvidantoj kaj per reta lernado. La tria jaro ebligas **specialiĝojn**: pri internacia kaj interkultura komunikado, interlingvistiko, lingvistiko kaj literaturo de esperanto, tradukado kaj instruado. La lasta estas tre grava kaj la plej altnivela **formado de esperanto-instruistoj**.

Tiu tria jaro ebligas specialiĝon pri **instruado de esperanto** – kunlabore kun **ILEI** kaj **Edukado.net**, kie vi akiros sisteman superrigardon pri la instrua procezo kaj detalan metodaron de instruado de esperanto en aktiva formo. La riĉa programo prezentos interalie ankaŭ la instruhelpilojn (instruista kofro), la modernan teknologion en instruado (retkursoj), la organizadon kaj planadon de diversaj kursoj.

**Informoj** troviĝas sur la retpaĝoj de IS: <http://www.amu.edu.pl/~inter/> kaj peteblas ĉe: [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl). Plie, aperas informoj en RE de majo 2014 kaj en numero 2014-2 de Internacia Pedagogia Revuo (IPR). **Aliĝu** rapide, sed plej malfrue ĝis la 15-a de aŭgusto!

UEA engaĝas sin pli forte en la sukcesigo de la nova kursaro, kunlabore kun *Esperantic Studies Foundation* (ESF). Nova interkonsento estas akceptita inter la tri partioj, kiu ne nur certigas financadon por kelkaj stipendioj, sed krome disponigas rimed(et)ojn por fortigi la administradon ĉirkaŭ la kursoj. La dokumento starigas plie tri-personan Komisionon por gvidi la kunlaboron inter la tri organizoj. Tiu komisiono

tre baldaŭ anoncos detalojn pri la stipendia programo por la kursaro 2014-2017. Stipendipetoj devos alveni ĝis la unua de julio, 2014.

Kiel signo de tiu fortigita engaĝigo, spektu alvokon de la prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes, je: <http://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=246>, Videbla ankaŭ ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=yUYQUdbfbNo>, kie troviĝas pliaj filmoj pri la kursaro.

Pliaj filmoj:

<https://www.youtube.com/watch?v=dNt4B0bHNDE>

<https://www.youtube.com/watch?v=2x2hxf3Bho4>

<https://www.youtube.com/watch?v=NUEKadaJetg>

Ni vokas al Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA, kaj landaj sekcioj de TEJO kaj ILEI: konigu la kursaron inter viaj membroj kaj kuraĝigu partoprenon. Bv. ekzemple plusendi la alvokon al viaj membroj aŭ afiŝigi la PDF-version en viaj retejoj.

Pro la fakto, ke la internaciaj stipendioj ne povos kontentigi ĉies bezonon, konsideru la eblon oferti mem subtenon al viaj membroj – tio efektive jam sukcese okazis. Estas en via propra intereso havi en via lando aŭ fako pli alte kvalifikitajn ekspertojn kaj instruistojn.



Foto el la kursaro de 2011



Foto el la kursaro 2014